Jaro IV (VI) Junio 1911. № 6 (51).

ESPERANTYSTA POLSKI

POLA ESPERANTISTO

SIMPLA, FLEKSEBLA, BELSONA, VERE INTERNACIA EN SIAJ ELEMENTOJ LA LINGVO **ESPERANTO** PREZENTAS AL LA MONDO CIVILIZITA LA SOLE VERAN SOLVON DE LINGVO INTERNACIA.

PROSTY, GIĘTKI, DŹWIĘCZNY, PRAWDZIWIE MIĘDZYNARODOWY W SWOICH PIERWIASTKACH JĘZYK

ESPERANTO

PRZEDSTAWIA ŚWIATU CYWILIZOWANEMU JEDYNE PRAWDZIWE ROZWIĄZANIE KWESTJI JĘZYKA MIĘDZYNARODOWEGO.

CAŁA GRAMATYKA ESPERANCKA SKŁADA SIĘ Z 16 PRAWIDEŁ BEZ WSZELKICH WYJĄTKÓW, A SŁOWNIK—Z PARU TYSIĘCY PIERWIASTKÓW I TRZYDZIESTU PARU PRZYBRANEK (SUFIKSÓW) I PRZYSTAWEK (PREFIKSÓW), PRZY POMOCY KTÓRYCH TWORZY SIĘ NADER BOGATY JĘZYK O NIEZLICZONEJ ILOŚCI SŁÓW POCHODNYCH, ZDOLNY WYRAZIĆ NAJSUBTELNIEJSZE ODCIENIA MYŚLI I UCZUĆ LUDZKICH.

NAUCZENIE SIĘ GRAMATYKI JĘZYKA „ESPERANTO" BEZ NAUCZYCIELA WYMAGA NAJWYŻEJ GODZINY CZASU.—KILKA TYGODNI RZETELNEJ PRACY PO PARĘ GODZIN DZIENNIE WYSTARCZA DO GRUNTOWNEGO NAUCZENIA SIĘ TEGO JĘZYKA—BIEGŁOŚCI W MOWIE I PIŚMIE MOŻNA NABRAĆ W CIĄGU KILKU MIESIĘCY, CZYTAJĄC ESPERANCKIE PISMA I KSIĄŻKI I PROWADZĄC Z ESPERANTYSTAMI KORESPONDENCJĘ.

!UCZMY SIĘ ESPERANTA!

Numer 15 kop.

Od Administracji „Esperantysty Polskiego".

Uprasza się p. p. prenumeratorów o zawiadamianie Administracji „Esp. Pol." (Hoża 20) **o zmianie adresu**. Nieregularny odbiór pisma bywa prawie wyłącznie skutkiem niezakomunikowania **nowego adresu**.

Członkowie „Pols. Tow. Esp. (Warsz.), życzący sobie w 1911 roku otrzymywać „Esp.Pols.", raczą go zaabonować w naszej Administracji (Hoża 20), lub za pośrednictwem księgarń.—Prenumerata roczna wynosi 2 rb. 50 kop.; bez „Roczn. Liter."—2 rb.

Ze wszelkiemi reklamacjami prosimy zwracać się tam, gdzie została opłacona prenumerata. Administracja bezpośrednio przyjmuje reklamacje tylko od tych pp. prenumeratorów, którzy nadesłali swe zamówienia i prenumeratę wprost do Administracji „Esp. Pols".

En Ago — venko nia!

POLA ESPERANTISTO

Monata Gazeto por propagando de Esperanto



ESPERANTYSTA POLSKI



Miesięcznik poświęcony sprawie Języka Międzynarodowego

Junio 1911.	WARSZAWA—VARSOVIO.	Jaro IV (VI) — Nro 6 (51)

ERNEST ARCHDEACKEN.

Na drogach postępu.

Ze smutkiem niemal codziennie spostrzegam, jak bardzo społeczeństwo ociąga się z wkroczeniem na drogę postępu i jak dalece ludzie, którym wykształcenie i pozycja społeczna kazałyby iść w kierunku rozwoju, okazują się bez powodu największymi jego przeciwnikami.

Kiedy ongi ukazały się pierwsze bicykle i rowery, zwolenników ich obrzucano całym potokiem drwin. A jednak byli to przeważnie ludzie ubodzy, którzy za cenę wielkich wysiłków materjalnych nabyli kosztowny wynalazek.

Ludzie „szyku“ dopiero wówczas pogodzili się z rowerem, kiedy inicjatywa i cierpliwa praca plebsu narzuciła go społeczeństwu.

Przez długie lata wzloty balonami, które dzisiaj stały się sportem modnym, były wyłącznym polem popisu aeronautów jarmarcznych. Bogaci byli zbyt wielkimi tchórzami lub zbyt zacofanymi, aby módz się tym zajmować.

Kiedy przyszła kolej na automobile, było znowu to samo. I tym razem nie potentaci finansowi byli propagatorami tego doniosłego wynalazku...

Co do mnie, to nie zapomnę nigdy tych drwin, jakie padały na mnie ze strony moich przyjaciół — ludzi „sfery“, kiedy w r. 1890 t. j. przed 20 laty próbowałem wynalazku mego przyjaciela Serpollet'a, niedawno zmarłego.

— Czyż to nie trzeba być warjatem — mówili moi przyjaciele — aby szukać kurzu i sadzy, parzyć sobie palce i majstrować przy mechaniźmie, zamiast zostawić to mechanikom zawodowym. Jakże chcesz, aby nam to zastąpiło konie?

Kiedy zacząłem zajmować się aeroplanami, słyszałem znowu podobną zwrotkę: miałem stanowczo bzika i należało mnie oddać do zakładu umysłowo chorych.

Moimi prześladowcami byli ci sami, którzy drwili z samochodów i których doświadczenie niczego nie nauczyło. A ponieważ na nieszczęście rozpowszechnienie rzeczy nowej nie może się obejść bez poparcia pieniężnego — więc wpada się niechcący w błędne koło.

Ludzie inteligientni i czynni nie mają pieniędzy, a ludzie majętni często nie mają inteligiencji. Ci ostatni chętnie wydają na rzeczy zbytku, na ostentację, grę lub tracą pieniądze w sposób nie przynoszący im zaszczytu.

Wszyscy ci, co jeszcze wczoraj drwili, dziś z zadowoleniem bryzgają błotem, mknąc na samochodach i spoglądają z góry na tych, którzy pracą i wiarą w powodzenie, zapewnili automobilom przyszłość.

Dziś awjatyka i aeronautyka, tak wyśmiewane do niedawna, zadziwiły świat postępami swojej techniki i dziś są na drodze do zdobycia ostatecznego tryumfu.

Wprost bajeczne wyniki postępu ostatnich czasów w dziedzinie wynalazków i rozmaitość środków lokomocji w ogólności, a w aeronautyce w szczególności, wykazały konieczność wzajemnego porozumiewania się narodów. Za udoskonaleniem środków komunikacji powinno iść udoskonalenie sposobów porozumiewania się duchowego, a tem samem występuje i konieczność języka powszechnego.

Już Montesquieu w r. 1728 pisał: „Stosunki narodów są tak rozległe, że powstaje konieczna potrzeba języka międzynarodowego“. A kiedy pisał te słowa, nie mieliśmy jeszcze żeglugi parowej, kolei żelaznych, telegrafów, telefonów, które nadają jeszcze większe znaczenie jego twierdzeniu.

Niewygoda, wynikająca z takiego stanu rzeczy, jest tak wielką, że starają się temu zapobiedz, a stąd wszystkie państwa kładą nacisk na naukę języków żyjących w szkołach. Nie będzie uprzedzeniem z mej strony, jeżeli powiem, że nauka najróżnorodniejszych języków nie rozwiąże tej kwestji i musi upaść zupełnie. Pamięć ludzka ma swoje granice; liczba ludzi, mogących nauczyć się praktycznie dwóch, trzech języków, jest ograniczona, a przecież liczbą ludzi, będących w stosunkach z różnymi narodami o rozmaitych narzeczach, ciągle wzrasta.

A więc, jeżeliby wam powiedziano: „Istnieje sposób bardzo prosty, bardzo praktyczny porozumiewania się z ludźmi, mówiącymi wszystkimi możliwymi językami, którzy dzięki temu sposobowi zrozumieją was i z łatwością rozmawiać będą z wami bez potrzeby nauczenia się tego lub owego języka, dla przyswojenia zaś sobie tego sposobu nie potrzeba nic więcej, jak około 20 godzin nauki i wydatku kilku franków“ — z pewnością przyjęlibyście takie zapewnienie z niedowierzaniem; a jednakże jest to niezaprzeczoną prawdą. Ten środek — arcydzieło w swoim rodzaju — istnieje i jest nim międzynarodowy język Esperanto, gienjalnie utworzony przez d-ra Zamenhofa.

I tu muszę zaznaczyć raz jeszcze, że i w tej inowacji, jak w wielu innych, widzimy gromadę zacofańców, występujących przeciw językowi Esperanto. I tutaj znowu tylko warstwy upośledzone materjalnie zrozumiały doniosłość nowego języka.

Znam dostatecznie świat esperancki we Francji; napewno zaledwie setna jego część żyje z renty, reszta to skromni pracownicy, którzy przecięciowo zarabiają 2000 fr. rocznie i którzy czas wolny od pracy poświęcali nauce Esperanta. A jednak ci biedacy, ci skromni pracownicy, będą mieli zasługę rozpowszechnienia międzynarodowego języka, i chociaż przeszkody opóźnią poniekąd tryumf Esperanta, niemniej jednak zdobędzie on sobie świat cały.

Tłom. z franc. *H. K.*

OSKAR WILDE.

La Poeto.

Vivis vilaĝano kaj ĉiuj en la vilaĝo amis lin, ĉar li sciis rakonti fabelojn. Matene li forlasadis la vilaĝon kaj vespere revenadis. La vilaĝanoj, lacigitaj de laboro, ĉirkaŭis lin kaj demandis:

— Diru, kion vi vidis?

Kaj li rakontis al ili:

— Mi vidis en la arbaro faŭnon, kiu ludis sur fluto kaj ĉirkaŭ li dancis junaj silfoj.

— Rakontu ankoraŭ — petis la vilaĝanoj.

— Mi vidis sur mara bordo tri sirenojn; ilin surportis ondoj de alfluo, kaj ili kombis siajn verdajn harojn per oraj kombiloj.

Kaj la homoj amis lin pro belaj fabeloj.

Iu fojon matene li foriris de la vilaĝo; li venis al la maro kaj jen li ekvidis tri sirenojn. Ili petolis sur dorsoj de ondoj kaj kombis siajn verdajn harojn per oraj kombiloj. Li iris pluen, en la arbaron kaj ekvidis faŭnon; faŭno ludis sur fluto kaj ĉirkaŭ li dancis aro da junaj silfoj...

Vespere li revenis la vilaĝon kaj la vilaĝanoj petis lin pri fabeloj...

— Rakontu, kion vi vidis hodiaŭ?

Kaj li respondis al ili:

— Hodiaŭ nenion mi vidis.

Trad. *M. Cz.*

JERZY ŻUŁAWSKI.

La Kiso.

Tio estis unu el la idilioj, kiujn oni travivas, havante dudek jarojn.

Mi tenis ŝin en la manoj, kiel birdon... Komparo ne nova kaj ofte trouzata, sed ŝi vere estis kiel birdo, kiu timas, sed ne forflugas. Ne forflugas, sciante, ke ĝi donas feliĉon, ke ĝi estas ĉielarko kaj brilo kaj aromo supertera por tiu, sur kies mano ĝi eksidis trafluge...

Kaj nun, hodiaŭ mi timas paroli pri tio laŭte, kvankam ŝi jam forestas: mi tiam ankaŭ ne kuraĝis paroli pri mia amo, timante ŝin per vorto fortimigi.

La floroj septembraj por ni parolis sur la herbejoj aŭtunaj starante; nur vento facila, kiu maturajn fruktojn de arboj forskuadis kaj inter niaj buŝoj traflugadis bonodora, alportadis al ni kisojn, des pli purajn, ke sonĝitajn nur, des pli flamajn, ke nur sonĝitajn...

Kaj venis la tago, kiam ni devis disiĝi...

Mi staris antaŭ ŝi, ankoraŭ tiam ne kuraĝante malfermi buŝon por diri, ke mi ŝin amas, ke ŝi estas por mi majo kaj brilo, paradizo kaj trankvilo...

Sed ŝi sciis, kion mi volis diri kaj sciis, ke mi ne parolas tial, ke ŝi estas por mi sankta. Ni ambaŭ havis okulojn plenajn de larmoj.

Tiam ŝi prenis mian manon kaj — antaŭ ol mi povis rimarki, alpremis ĝin al sia buŝo, flustrante:

— Mi dankas vin, ĉar vi estis bona por mi...

Mi falis antaŭ ŝi sur genuojn kaj mi sentis ŝiajn manojn ĉe mia buŝo, kaj poste ŝian buŝon — dolĉan, knabinan, neniam kisitan...

Neniam mi ŝin vidis poste...

Sed hodiaŭ post jaroj, kiam mi malfermos la okulojn kaj penson, en batalo de l' vivo malpurigitan, — en pli puran turnos sferon — mi ree vidas ŝin antaŭ mi: ŝi venas kiel nebulo, kiel sonĝo, kiel rememoro de l' sankteco; en arĝenta lumo de l' luno aŭ en helbuo matena mi ree aŭdas ŝian voĉon:

— Mi dankas vin, ke vi estis bona por mi...

Kaj el ĉiuj am-ĵuroj kaj pasiaj konfesoj, el ĉiuj vortoj dorlotaj kaj amaj, kiujn mi poste el multaj buŝoj aŭdis,— plej karaj estas por mi ĉi-tiuj vortoj simplaj kaj mallaŭtaj; el ĉiuj kisoj, ĝuitaj poste, plej kara estas por mi tiu kiso la unua, kiun ne sekvis dua...

Trad. M.

L. STAFF.

* * *

Tysiąc harf mi zdaleka *Gra pieśnie:* *„Jedno serce cię czeka* *Gdzieś, we śnie“...*	*De mil harpoj alfluas* *Kant-Koro:* *„Hej, en sonĝo atendas* *Vin koro“...*
Tysiąc harf im odbrzmiało *Boleśnie:* *„Jedno serce skonało* *Zawcześnie“...*	*Eĥo ĝemon de harpoj* *Renportis:* *„Unu koro tro frue* *Jam mortis“...*

Esp. *M. Ĉ.*

ADAM MICKIEWICZ.

Polały się łzy moje...

Ekfluis larmoj miaj...

Polały się łzy moje czyste, rzęsiste
Na me dzieciństwo sielskie, anielskie,
Na moją młodość górną i chmurną,
Na mój wiek męski — wiek klęski...
Polały się łzy moje czyste, rzęsiste...

Kantata laŭ melodio de I. Paderewski.

Ekfluis larmoj miaj la klaraj, radiaj
Sur mian infanecon anĝelan kaj helan,
Sur la aĝon junulan, altflugan, nebulan,
Sur mian aĝon viran, la aĝon martiran,
Kaj fluis larmoj miaj la klaraj, radiaj...

Tradukis Roman Dobrzański.

La Renkonto.

Li sidis sur la benketo en la Aleo kaj dormetis.

Estis la 1-a horo post meznokto. Mi ekkonis lin tuj. Li estis mia iama lerneja kolego, kiu jam en la gimnazio montradis inklinon al poezio. Li ricevis diplomon kun mencio kaj ekstudis en la universitato, kiun li ne finis. Li enamiĝis en unu provincan aktorinon kaj kun ŝi forveturis. De tia tempo mi lin ne vidis. Nur hieraŭ nokte, en Aleo, mi rekonis lin, malgraŭ, ke li estis tiel mizer-aspekta.

Li vekiĝis, kiam mi aliris.

— Ĉu vi rekonas min? — mi demandis.

— Jes, mi rekonas.

— Kial vi ĉi-tie sidas?

— Al mi estas ĉi-tie bone.

— Kie vi loĝas?

— Nenie.

— Ĉu vi delonge estas en Varsovio?

— De tri tagoj.

— Kie vi estis ĝis nun?

— Ĉie.

— Vi havas edzinon?

— Jes.

— Kie ŝi estas?

— Mi ne scias.

— Kial?

— Ŝi forkuris.

— Ĉu vi havas infanojn?

— Ne, mi havis, sed ili ĉiuj mortis.

— Kion vi faras en Varsovio?

— Nenion.

— Kaj kion vi intencas?

— Nenion.

— Kiajn vivrimedojn vi havas?

— Neniajn.

— Iru al mi por pasigi nokton.

— Mi ne volas.

— Sed kie vi dormos?

— Ĉi-tie.

— Oni vin arestos.

— Ili arestu.

— Kaj enŝlosos vin...

— Tre volonte.

— Ĉu vi bezonas monon?

— Ne.

— Ah, mi rememorigis, ke mi jam de longe ŝuldas al vi 15 rublojn. Nun mi redonas ilin al vi kun danko.

— Senbezone. Mi donacas ilin al vi.

— Stranga vi estas homo. Eble vi havas ian deziron, diru.

— Jes, unu...

— Nu?

— Foriru kaj lasu min trankvila.

— Estu sana.

— ...sana.

Mi foriris kaj li komencis laŭte plori...

El pola gazeto „Dzień".

Trad. *M.*

El tiama tempo.

(Notoj pri la glora verkisto Dickens.)

Se ia praavo povus viziti nian belan mondon — praavo el la 16-a aŭ 17-a jarcento — li certe ne komprenus ĉiun el niaj nunaj faroj, malpli ankoraŭ li komprenus nian kompleksan vivmanieron kaj niajn senfinajn, kompleksajn dezirojn.

La literaturo liatempe ne estis tiel diversflanka kaj riĉa kiel nun; la libroj el ĉiu fako estis malpli akireblaj por ĉiu kaj oni ne povis distriĝi tiom per amuza legaĵo, kiel en la nuna tempo. Nur malmulte da tiu ekzistis; la jam ekzistanta ne estis altiga aŭ instrua; la moralo en ĝi estis ofte nek bona, nek imitinda, kaj la temoj pritraktitaj estis malveraj fantaziaĵoj, kiuj neniel povus okazi.

Tiuj nebelaj historioj pri malnoblaj, senvirtaj herooj kaj malherooj kaj neeblaj okazaĵoj fine ne plaĉis plu al la legema publiko kaj kun plena danko kaj eĉ avideco oni legis pli poste, kelkajn historiojn, el la vivo elĉerpitajn, kiun elpensis pionira verkisto — Samuel Richardson (1740). Ili estis tiam kun plezuro akceptitaj, kvankam (de nia nuna vidpunkto) liaj historioj estas iom pezaj kaj eĉ iom tedaj rilate al stilo.

En la lasta jarcento la angla legantaro ĝojiĝis ankoraŭ pli, ĉar — ho, feliĉo — novelaro eniris en plej alloga stilo, veroplene montrante ĉiun okazaĵon el la homa vivo kaj elspirante ĉiun senton de l' homa koro; interesega, sprita, serioza, kortuŝa legaĵo, kiu mirigis ĉiun.

Kaj kiu verkis tiujn belajn novelojn? Estis nia amata kaj glora Dickens.

Charles Dickens, kies nomo estas konata de ĉiu instruita fremdulo, naskiĝis en Landport (suda Anglujo) en jaro 1812. Liaj gepatroj estis malriĉaj, kaj lia juneco, pro tio kaj aliaj kaŭzoj, estis tre malĝoja. Jam en frua knabeco li devis komenci perlabori sian propran vivon, kaj farante tion, li travivis ĉiun specon de vivado en ĉiu speco de cirkonstancoj.

Londono.

Estante malforta knabo, li prefere legis, anstataŭ ludi kun aliaj knaboj. Tiamaniere disvolviĝadis lia spirito kaj ankaŭ lia eksterordinara observemo. Li posedis la kapablon scii (aŭ senti instinkte) la plej kaŝitajn motivojn kaj pensojn de l' homoj, kaj pro tio ĉia penso, eĉ la plej malgrava, en liaj verkoj estas interesa kaj koninda. En mirinda maniero li rimarkis (kaj *memoris*) detalojn de l' ĉiutaga vivo kaj posedante mem fortan spirit-akrecon, al kiu estis ligitaj kor-boneco, simpatio, saĝeco kaj tiu jam citita *kompreno* de l' homoj, li montras al ni la bonon (aŭ la malbonon) en la homa koro tiamaniere, ke altigas, ĝojigas kaj kortuŝas per la legado. La malbonon li malkovras kompate, sen ia malico, sed tamen sen trobonigo: ĉiam li montras, ke malbono restas malbono, ke malvirto ne estas honorinda. Liajn personojn oni vidas antaŭ si kvazaŭ ili vivus kaj estus konatuloj.

Estas baldaŭ la centjara datreveno de nia kara Dickens, kaj la angla nacio intencas doni al li (t. e. al liaj idoj kaj infanidoj) tributon de neforgeso kaj danko. Ni intencas meti en ĉiun libron de Dickens (34 ĉefverkoj) memormarkon; kaj sciante, ke 24 milionoj da libroj eliris tiutempe (kaj nun ĉiam denove eliras), oni vidas, ke permarka enspezo amasiĝos eĉ grandan monsumon por liaj parencoj.

Tiu Dickensa jaro estas ankaŭ interesplena por ni *esperantistoj*, ĉar novjare (1911) eliris „La Batalo de l' Vivo", mallonga amrakonto de Dickens, kiu unue presiĝis en *„La Esperantisto" de D-ro Zamenhof en 1891*. La Majstro tradukis ĝin mem, sed ĉar ĝi estis tradukita el germana traduko, la Doktoro ne represigis ĝin; do kelkaj amikoj elpetis permeson de li, ĝin reeldonigi, kaj nun per tiu libreto ni konvinkiĝas, ke la Esperanto de 1891 estas same fundamenta kiel la Esperanto de 1911.

Per Esperanto naciaj verkistoj fariĝos tutmondaj.

Por „Pola Esp." verkis *Ad. Ŝefer.*

Homaj idealoj.

La homaro penadis ĉiam atingi idealon kaj ĉiam laŭ sia kompreno. La antikvuloj serĉadis famon kaj militan gloron, politikan potencon kaj havaĵon — kaj ĉion, kio ŝajnis esti feliĉiga. La mezepokuloj, loĝantaj en Eŭropo kaj en najbaraj de Eŭropo partoj de Azio kaj Afriko, estante sub influo de kristanismo, serĉadis idealon krom tio en animaj sukcesoj — kaj fine, dum tempo antaŭ franca revolucio kaj poste, la homaro kristaligis sian komprenon de idealo en vortoj: egalrajteco, libereco kaj frateco. Tiuj tri grandaj vortoj influas magike la homaron kaj precipe la homojn noblajn, verajn sciencistojn, altideajn, altspiritajn pensulojn. Tiuj - ĉi vortoj estas ankaŭ la bazo de idealo de la esperantismo. Sed oni povas tre facile konvinkiĝi, ke egalrajteco, libereco kaj frateco de tuta homaro ne povas esti aliamaniere atingita, ol nur per pero de Esperanto, kiu estas unika perilo por alproksimigi diversajn popolojn reciproke al si kaj neniigi la reciprokajn malkonfidojn. Pruvon de tio oni trovos post pripenso de la signifo de tiuj-ĉi vortoj kaj de homara idealo:

Egalrajteco de ĉiuj homoj. La homaj sciencoj ne instruas nin kun plena certeco, kun neerarebla decido pri nia deveno. Unuj sciencistoj asertas, ke la homo estas nur plisupera grado de besto, ke en ĉiama evoluado de l' naturo ĉiuj estajoj fariĝadas dum tempspaco ĉiam pli perfektaj, kaj ke la homo, apartenante al produktajoj de naturo kiel ĉiuj aliaj estajoj, ne estis tia sama en la komenco de sia deveno, kia li estas nun, sed ke lia antaŭulo, prapatro, estis natura ĉeleto kaj, perfektiĝante dum tre longa tempo, fariĝis eble ia kreskajo aŭ ia estaĵeto kiel infuzorioj; poste ĝi fariĝis jam plisupera estajo, ia fiŝo aŭ amtibio aŭ rampajo, poste ia birdo, poste surtera besto pli malsupera, poste pli supera, fine ia simio, kaj de simio ĝi fariĝis jam pli supera necivilizita homo, kiu jam mem komencis helpi al sia kreinto — naturo kaj fariĝis homo civilizita, homo nuna. Ne ĉiuj sciencistoj asertas tion saman, ĉar diversaj sciencaj sistemoj reciproke batalas inter si en tiu rilato, sed ĉiuj ili ne estas tute certaj pri nia deveno kaj ne povas liveri sufiĉantajn argumentojn kaj pruvojn, ke tio, kion asertas la religioj pri homa deveno, pri homa origino — ne estas vero. Nur tion neniu scienco neas, ke ĉiuj homoj havas komunan devenon, ke ni ĉiuj devenas de unu kaj tiu sama originalo.

Certe, estas homoj, kiuj asertas malgraŭ nia komuna deveno, ke ĉiuj homoj ne estas egalaj, ke ekzistas rasoj kaj popoloj pli valoraj kaj malpli valoraj, ke unuj popoloj estas elektitaj kaj destinitaj por regi sur mondo, kaj aliaj — por esti sklavoj. Sed veraj pensulojsciencistoj kontraŭbatalas tion kaj diras, ke ĉiuj homoj estas egalaj, kaj ke nepre venos la tempo, kiam ĉiuj homoj estos efektive egalrajtaj. La historio pruvas, ke la homaro neniam praktikadis egalrajtecon. Ĉiuj popoloj malestimadis aliajn popolojn kaj opiniis aliajn popolojn malpli valoraj, kaj eĉ en mezo de tiu sama popolo unu civitanoj estadis opiniitaj kiel pli valoraj ol aliaj. Sed mirinde... inter ĉiuj popoloj dum antikvaj epokoj la virinoj estis ŝatataj kiel malpli superaj estaĵoj, eĉ preskaŭ ĝis tia grado, ke la virino estis ŝatata kiel propraĵo de viro, kun kiu li povis agi laŭ sia volo: devigi al laboro, vendi, bati, eĉ mortigi kiel ian ajn sian propran beston.

Nun la kristanismo plisuperigis homan indecon de virino egaliginte ŝin kun viro, kaj donis ekzemplon ankaŭ al konfesantoj de aliaj religioj, ke nune preskaŭ inter ĉiuj popoloj, esceptante nur mahometanojn, virino estas ŝatata pli supere ol antaŭe. Sed ĝis nun la virino bedaŭrinde ne havas tian rajtecon, kian havas la viro.

Por egalrajtigi ĉiujn homojn sur tuta terglobo estas nepre, ke ĉiuj homoj povu sin reciproke ekkoni kaj ekkompreni. Tio ne povus esti ebla, se ne ekzistus unu komuna al ĉiuj 'popoloj kaj al ĉiuj homoj — kleraj ĉu malkleraj — ellernebla lingvo krom ilia nacia lingvo. Do Esperanto, kiu plenumas ĉi-tiun taskon tutplene kaj mirinde bone, estas la ĉefa bazo por egalrajteco de ĉiuj popoloj kaj ĉiuj homoj. Kiam la homoj povos sin reciproke kompreni, ili jam ne atentos diferencon de siaj gepatraj lingvoj, la popoloj ne altrudados sian lingvon al aliaj popoloj, ĉar tio estos senfrukta kaj senbezona. Neniu estos devigata paroli kun alilingvulo per pero de lingvo al iu ajn el inter ili malagrabla, ili havos ja komunan lingvon Esperanto, kiu kiel komuna por tuta homaro, kiel propraĵo de ĉiuj, estos al ĉiuj agrabla, kaj ne estos incitanta

inter diversaj alilingvanoj lingvan malamikecon kaj malsaĝan ŝovinismon nacian.

Al efektiviĝo de tuthomara egalrajteco bezona estas ankaŭ vera justeco kaj moraleco, ĉar nur justaj kaj moralaj homoj ŝatadas aliajn proksimulojn kiel sin mem kaj juĝadas iliajn farojn kaj konduton dece kaj ĝuste. Sed por esti al iu ajn justa, estas nepre lin kompreni kaj al li sen malamikeco proksimiĝi kaj por tio estas ankaŭ bezona komuna, senpartia lingvo, kia estas Esperanto. De tio sama dependas ankaŭ interpopola moraleco, aŭ moraleco rilatanta interpopolajn aferojn, ĉar kiam pli potencaj popoloj ne havos lingvan superecon rilate al aliaj popoloj kaj ne havos bezonon altrudi sian lingvon al aliaj popoloj, tiam malaperos en politiko lingva ŝovinismo kaj kune kun ĝi ŝovinismo nacia. Estos ja ankoraŭ aliaj kaŭzoj por ŝovinismo inter popoloj, kiel diverseco de religioj k. a., sed tiuj kaŭzoj estos jam pli malgrandaj kaj pli malgravaj ol diverseco de lingvoj. La plej grava malhelpo al egalrajteco politika, lingva ŝovinismo, malaperos en mondo post kiam Esperanton alprenos ĉiuj popoloj, kaj tiamaniere Esperanto proksimigos tiun homan idealon: la egalrajtecon de ĉiuj popoloj.

(Daŭrigo sekvos.)

Lwów. *Hieronim de Wierzchowski*

Morto estas vivo.

„Morto — estas vivo“ — diris unu el nuntempaj pensuloj. La frazo sonas kiel paradokso, sed ni penu analizi ĉitiun riskan opinion de scienculoj.

Kiel tago kaj nokto alternas reciproke, kunokazante sur ambaŭ duongloboj, de nia planedo samtempe, tiel morto kaj vivo ekzistas samtempe kaj alternas pro senĉesa cirkulado de materio en la naturo. Do morto ne estas ago detruanta; kontraŭe, ĝi estas ago krea, ĉar ĝi malfermas vojon al nova vivo, al novaj formoj, al novaj metamorfozoj.

Ĉi-tie ni konsideras nur flankon materialan, fizikan, ne tuŝante flankon psikan, ĉar tiurilate, por homo kredanta, morto estas nur trairo el unu ekzisto al la dua, estas nur dua duono de lia vivo — pli alta, senfina, pli perfekta, eterna...

Nenio en la naturo pereiĝas — diras scienco, pruvante, ke fortoj kaj materio estas neelĉerpeblaj, nepereigeblaj, ke sen vivo — ne ebla estas morto kaj sen morto — ne ebla vivo... ke morton subtenas vivo. Ŝajnas, ke tio-ĉi estas nekredebla, sed tamen sufiĉas konsidere ekrigardi ĉi-tiun misteron por konvinkiĝi, ke tio estas vero.

Potenca, neesplorebla, krea forto pleniĝas tutan mondon per multego da specoj de ekzistaĵoj kaj vivaĵoj, kiuj nur dank' al senĉesa batalo por estado, pli aŭ malpli longe ekzistigas sian vivon. La senkompata interbatalo por ekzisto kaj natura — pro aĝo kaj malsanoj — maldensigado de vivantaj estaĵoj — malpermesas tro grandan disvolvon de organizmoj bestaj kaj vegetaj, senĉese regulante ĝin ĝis certa normo. Se nur por unu momento da tera tempo ĉesus ĉi-tiu egalpeziga harmonio kaj iro de morto estus haltigita — kaj, se ĉiu novnaskita besto aŭ novĝermanta kreskaĵo konservus sian vivon super norma limo — baldaŭ tuta mondo plenpleniĝis per tia multego da kreaĵoj, ke fine mankus por ili loko kaj nutraĵo.

Vivo devus tiam malaperi, ĉar ĉiuj kreitaĵoj natur-kaŭze interpremiĝus. Aeron ĉirkaŭantan teron plenigus kunpremita maso da birdoj kaj insektoj; sunaj radioj ne povus atingi teron kaj tio-ĉi pereigus teran vivon, ĉar sen suno ĝi ne povus daŭri. Kaj tiam terglobon sternus kadavroj bestaj kaj vegetaj; mallumo kaj senvivo ekregus sur tero, kiun potenco de morto konservas en hormonio de vivo kaj evolucio. Do, ĉu ne vere, ke morto — estas vivo?

Oni scias, ke organizmoj malsuperaj posedas multe pli grandan vivdaŭron kaj naskigan forton kompare kun organizmoj superaj. Iu speco de mikroskopaj estaĵoj - fungetoj multiĝas en daŭro de

kelkaj horoj multbilione, tiel, ke ĝi haltigus disvolvon kaj eĉ ekziston de aliaj kreaĵoj. Alia mikroskopa estaĵo naskas dumjare sepdek genereciojn. Se ĉi-tiuj mikroestaĵoj povus vivi plu, povus disvolviĝi kaj multiĝi en la sama rilato — ni imagu, kio okazus en baldaŭo.

Nia ordinara muŝo estas kapabla naski dumsomere 20 mlionojn da idoj. Se ili ĉiuj konservus la vivon — ilia nombro post kvin jaroj atingus teruran kvanton. Same sennombre multiĝas akridoj, araneoj kaj ĉiaj insektoj.

Starantaj multe pli alte sur ŝtuparo de besta hierarĥio — fiŝoj, havas ne malpli grandan naskigan forton. Ekzemple gado jam de tria jaro de sia vivo aperigas ĉiujare de 8 ĝis 9 milionojn da ovoj kaj fiŝoj eligitaj el ili post kelkaj jaroj superplenigus marojn.

En Holandujo fiŝistoj ĉiujare salas 624 milionojn da gadoj kaj ĉe Nov-Fundlandaj bordoj oni kaptas pli ol 300 milionoj da ĉi-tiu fiŝo atinganta pezon de 40 kilogramoj.

Eĉ elefanto, kvankam ĝi multiĝas malrapide — ĉar ĝi naskas idojn nur en trideka jaro de sia vivo — tamen, vivante pli ol 100 jaroj, ĝi restigas preskaŭ 90 idojn.

Suprecititaj ekzemploj pruvas, kiel benata estas rikolto de morto, gardanta mirindan harmonion en la mondo.

M.

Konsideru!

Pri akurateco kaj tempo (El Swett Marden)·

Sukceso estas ido de akurateco kaj precizeco.

— — — — — — — — — — — — —

Forto, kiun ni foruzas por prokrasti ion „ĝis morgaŭ", ofte sufiĉus por plenumo de tuta laboro.

— — — — — — — — — — — — —

Kiom pli malfacila kaj malagrabla estas prokrastita laboro! Tio, kion ni ĝustatempe eĉ kun fervoro farus, — post pli aŭ malpli longedaŭra prokrasto fariĝas ŝarĝo.

— — — — — — — — — — — — —

Neniam estas pli facile respondi leterojn ol respondi ilin tuj post la ricevo. Multaj grandaj komercaj firmoj akceptis regulon: neniam permesi, ke la letero atendu respondon.

— — — — — — — — — — — — —

Rapida alpaŝo al ia laboro aŭ okupo forprenas de ĝi tutan malagrablecon.

— — — — — — — — — — — — —

Prokrasto ofte egalas forlason kaj tio, kion ni intencis fari „poste", — plejofte restas neplenumita.

— — — — — — — — — — — — —

Kiu agas rapide, tiu, se eĉ li iafoje erarus, povas fari pli multe ol tiu, kiu laboras hezitante kaj prokrastante.

Manko da decido estas kvazaŭ malsano sola rimedo kontraŭ ĝi estas rapida decido. Kiu hezitas — pereos.

— — — — — — — — — — — — —

„Morgaŭ" — estas devizo satana. Ĝian pereigon pruvas miloj da ekzemploj en la historio; ĝi estas plej amata rifuĝo de mallaboremo kaj malkapablo.

— — — — — — — — — — — — —

Walter Scott skribas: „Kion vi devas plenumi — faru tuj kaj ripozu *post*, sed ne *antaŭ* laboro".

— — — — — — — — — — — — —

Neniam oni povas tro laŭdi kutimon de frua vekiĝo. Post okhora dormo, homo sana havas devon vekiĝi, leviĝi, vesti sin kaj komenci laboron.

— — — — — — — — — — — — —

Ekzistas homoj, kiuj senĉese ŝajnas rapidi; ili faras impreson, ke ili timas malfruiĝi al vagonaro; al tiaj homoj mankas la metodo kaj ili tre malofte sukcesas.

— — — — — — — — — — — — —

Ĉiu junulo devas konsideri grandan gravecon de bone funkcianta poŝ-horloĝo: tia, kiu funkcias nur „sufiĉe bone", emigas nin al malbonaj kutimoj kaj neakurateco.

M.

El opero »Halka«.

Romanco de Janusz.

Teksto de W. Wolski. Muziko de St. Moniuszko.

Agitato. ♩=88.

PIANO.

Ki - al en horo so- le - ca ti - a, Ki-am so pi - ris mi en mon-tar' Ek - bri - lis ĉar-ma vi - za-ĝo vi - a,

dolce un poco piu lento

Ek - bri-lis blon-da har-li-go vi - a, Bu - ŝo ko-ra - la. ri - det' ra-di - a,

impetuoso Lento.

Pu-pi-loj blu - aj sub o- -kul-har'?

Kial en horo soleca tia,
Kiam sopiris mi en montar',
Ekbrilis ĉarma vizaĝo via,
Ekbrilis blonda harligo via,
Buŝo korala, ridet' radia,
Pupiloj bluaj sub okulhar'?

Kial animo, kiel rivero
De l' vent', subite ekscitis sin?...
Sur vin orfino, sola sur tero,
Sur vin orfino, falis mizero,
Eterne sekvas vin malespero,
Kaj via plendo doloras min.

Tradukis *Antoni Grabowski*.

Atentu Esperantistoj!

La Higiena Ekspozicio en Dresden.

(Tre grava por Esperanto.)

La legantoj de „P. E." jam scias, ke tiusomere oni aranĝas kvin monatojn daurantan, grandegan higienan ekspozicion en Dresden. Tio estas entrepreno neordinare fama kaj grava por la tuta homaro kaŭze de tio, ke preskaŭ ĉiuj popoloj de la terglobo oficiale partoprenas la ekspozicion kaj ĉar ili prezentas ĉiujn plej bonajn, proprajn eltrovaĵojn kaj aranĝojn sur higiena kampo. En kiaj dimensioj ĉio estos eksponata, oni povas jam konkludi de tio, ke la ekspozicio etendiĝos sur la spaco de 320,000 □ m. kun 70,000 □ m. sub tegmentoj; tio estas pli multe ol oni uzis por la lasta ĝenerala internacia ekspozicio en Bruxelles.

Tiea esperantistaro kaj precipe membroj de la ekspozicia komitato: Dr-o Arnhold, v. Frenckell kaj Dr-o Schramm faras ĉion eblan por tiuokaze montri al tiea kaj fremda publiko la gravecon de nia lingvo kaj ni esperas, ke nia afero havos grandan sukceson. Sed ankaŭ vi, eksterlandaj esperantistoj, povas kaj devas helpi! Kiamaniere? Certe plej bone estus, se vi povus viziti esperantan antaŭkongreson, okazontan en Dresden la 17 kaj 18 de Aŭgusto. Sed ĉar tio estos ne por ĉiuj ebla, ni volas informi vin, kiel vi povas helpi kaj samtempe havi senpage grandan spiritan kaj moralan profiton. Oni eldonos tre luksan, riĉe ilustritan gvidlibron en esperanta lingvo por Dresdena ekspozicio en 20.000 ekzempleroj. En tiu-ĉi libro vi trovos tre interesajn artikolojn pri la ekspozicio kaj la verketo povas samptempe servi kiel tre efika propagandilo por Esperanto.

Tiun libron oni donacas kaj sendas al ĉiu deziranta ĝin — senpage, se li nur alsendos la malgrandan poŝtelspezon por forsendo, kiu konsistas nur 20 fenigoj, aŭ unu respondkupono alsendota sub adreso: Dr. Schramm, Dresden 20, Germanujo. *Sed atentu, en kio estas afero!*

La Saksa registaro volas konvinkiĝi el la nombro de aparte forsenditaj ekzempleroj de tiu-ĉi libro, kiun valoron posedas nun Esperanto por la granda eksterlanda publiko kaj de tio-ĉi ĝi dependigas gravajn decidojn pri esperanta instruado. Tial ĉiu esperantisto devas mendi aparte la libron, ne amase aŭ kune per societoj. Ni atendigas, ke respondkupono, ricevebla en poŝtoficejo, devas esti stampita de la vendata ĝin poŝtoficisto, kion oni ofte forgesas[1]. En multaj urboj oni povas ankaŭ aĉeti ĉe pli grandaj bankejoj germanajn poŝtmarkojn kaj tiufoje sufiĉas sendi poŝtmarkojn valorantajn 20 fenigojn *(2 markojn po 7 kop.)* sub supre nomita adreso.

Esperantistoj, viaj teoriaj konsentoj kun esperantistaj principoj kaj idealoj estas tre ŝatindaj; sed tiuj ne sufiĉas por konvinki la grandamason aŭ la registarojn pri la graveco de nia afero. „Je iliaj faroj vi ilin ekkonos" — estu la devizo! Ne restu indiferentaj rilate al nia peto. La peno estas ne granda, la monofero apenaŭ priparolinda kaj la servo por la esperanta movado povas esti granda!

Dresden, Majo 1911. *R. M.*

[1]) En Rusujo ne ekzistas tiu-ĉi bonega ilo.

Geografia karto de l' mondo ne surhavanta Utopion, ne meritas nian atenton, ĉar sur ĝi mankas sola lando, al kies bordo la homaro senĉese alfluas. Sed albordiĝante al Utopio, la homaro ne haltiĝas, sed ree komencas serĉe rigardi horizontojn kaj, ekvidinte pli bonan landon, ĝi ree komencas voj-iron. La progreso estas realiĝo de Utopio. *Oskar Wilde.*

El Esperanta Mondo.

Tutmonda Esperanto - Anonceekspedo. Por plifaciligi la reciprokajn interrilatojn inter negocistaro kaj aĉetantoj fondiĝis supernomita societo (Th. Anding, Berlin S. W. 48), celante utili ne nur al la amaso de esperantaj komercistoj, sed ankaŭ al la esperanta publiko.

La programo de agado enhavas jenajn punktojn:

Kolektado kaj presigo de anoncoj por ĉiuj esperantaj kaj naciaj gazetoj, kongreslibroj k. t. p.;

Presigo kaj dissendado de reklamfolioj;

Aranĝo de paroladoj pri Esperanto kaj aranĝo de esp. kursoj kaj ekspozicioj;

Kontrakta sol-vendado de specialajoj k. t. p. en ĉiu lando.

Do ĉiu, kiu volas, ke esperanto progresu inter la tutmonda komercistaro, uzu la servojn de l' T. E. A.!

Alvoko por Okcident-Siberia Ekspozicio. Dum somero de l' nuna jaro en urbo Omsk (okcidenta Siberio) estos organizata la unua Okcident-Siberia agrikultur - industria ekspozicio. Tiun ekspozicion vizitos multaj homoj el malproksimaj anguloj de Siberio kaj Rusujo. Tre grave estas, ke Esperanto estu plej bone reprezentota en tiu ekspozicio, por ke la kunvenontoj disportu la semojn de Esperantismo tra la tuta lando. Tial Tomska studenta rondeto decidis preni sur sin la organizadon de Esperanta fako en la ekspozicio, kaj ni esperas, ke la tuta esperantistaro unuanime helpos nin en tiu entrepreno. Ni petas pri alsendo de gazetoj, libroj, p.-kartoj ilustritaj kaj ceteraj esperantaĵoj. Grava estas ankaŭ la monhelpo; la rondeto ne posedas sufiĉe da mono kaj esperas kovri la elspezojn per la enspezoj de vendado en ekspozicio.

La komitato de l' Tomska studenta esperantista rondeto,

Adreso: Siberio, Omsk, Atamanskaja 6. dom Levina, al. A. Skalskij.

Internacia Kongreso de Filozofio kaj Esperanto. Nia kara Majstro ricevis el Italujo jenan telegramon:

„Ĵurnalistoj partoprenantaj en la ekskurso al Ravenna, dum la internacia kongreso de Filozofio, salutas en Vi la plej gloran apostolon de la kunfratigo de l' homaro."

D-ro Zamenhof respondis:

„Al la Ĵurnalistoj, kiuj partoprenis en la Ravenna ekskurso, dum la kvara Kongreso de Filozofio, mi sendas mian koran dankon pro la saluta telegramo, kiun ili sendis al mi. Mi esperas, ke l' afero, kies grandan gravecon ili komprenas, ili esploros ĉiam pli profunde, fervore laboros por ĝi kaj helpos al la forigo de l' malfeliĉiga surd-muteco, kiu regas inter la popoloj. Mi esperas, ke al la VII-a internacia Kongreso de Esperanto la Itala gazetaro ne forgesos sendi reprezentantojn kiuj povos detale kaj atente raporti al la Itala gazetaro pri la vera esenco kaj stato de l' esperantismo.

Zamenhof.

La traduko de l' Sankta Biblio. Brita Komitato entreprenis la eldonon de l' Nova Testamento. Pastro Rev. J. C. Rust (anglikano) gvidas ĉitiun komitaton kaj raportas pri siaj laboroj, ke pretaj por presado estas jam 1-a Korintianoj, Efesanoj, Filipianoj, Kolosanoj kaj Hebreoj; pretaj por korektado de s-ro Wackrill: Galatoj, 1-a kaj 2-a Tesalonikanoj, Jakobo, Judaso, 1-a kaj 2-a Petro; ankoraŭ ne korektitaj de pastro Rust: Evangelio de S. Johano, Romanoj, 1-a Timoteo, Tito, Filemeno, 1-a, 2-a kaj 3-a Johano, Apokalipso; verkataj de tradukantoj: S. Mateo, S. Marko, S. Luko, 2-a Korintianoj, 2 - a Timoteo. Pastro Rust tradukas nuntempe la libron „Agoj de l' Apostoloj.

Por studentoj. Ĵus eliris eldonita de la Grenoble'a grupo kun helpo de l' fakultato *Universitata Gvidfolio,* kiu klarigas la tutan organizon de la kursoj, speciale aranĝataj de 14 jaroj por *fremdaj studentoj dezirantaj akiri perfektan scion de l' franca lingvo.* Plue ĝi montras ĉiujn alloĝajojn, kiuj altiras ĉiujare al la ĉarma kaj pitoreska urbo Grenoble multajn fremdajn studentojn (pli ol 1100 dum la lasta jaro), inter kiuj jam kelkaj esperantistoj. Espereble multaj petos tiun gvidgvidfolion, sendatan senpage de la sekretario s-ro Roy, 3, Rue Anthoard, Grenoble (France), kaj helpos varbi al nia afero potencan societon en Grenoble, nome la Protektan Komitaton por fremdaj studentoj.

(Laŭ „Aŭstria Esperantisto".)

Kroniko.

Varsovio. Antaŭ nelonge fondiĝis filio de Rusa Esperantista Ligo sub prezido de nia ŝatata samideano d-ro A. Nauman; la rondanoj interkonsentis paroli dum la kunvenoj nur esperante, ĝuste konsiderante tian manieron, kiel plej bona rimedo por perfektiĝi en buŝa uzado de Esperanto.

— La komitato de Pola Esperantista Societo serioze klopodas por veki dormemajn varsoviajn samideanojn kaj tiacele ĝi eldonis specialan alvokon al la membroj kun respondilo pri aparteno al la Societo.

— Ni kun vera plezuro rimarkis, ke 63 ekzempleroj de „P. E.", dissendataj por propagando, laŭ listo de ilia oferema abonanto — estas tre volonte legataj en Varsoviaj konditorejoj, restoracioj, kafejoj k. t. p., kion pruvas ekstera aspekto de l' numeroj, montranta, ke ili estis en multaj manoj.

— Komitet T-wa Esperantysfów niniejszym podaje do wiadomości członków, że we czwartek, dnia 1 czerwca r. b. odbędzie się w lokalu T-wa Uranja (Bracka 18) o godzinie 8-mej wieczorem miesięczne zebranie członków T-wa, ostatnie przed wakacjami.

Program zebrania następujący:

1) D-r I. Dubrowicz — Lekcja próbna Esperanta.

2) Prezes A. Grabowski — O poczuciu językowym.

3) D-r I. Dubrowicz — O kongresie w Antwerpji.

4) P. Greffkowicz — O projekcie reformy prasy esperanckiej.

5) D-r W. Robin — O Powszechnym Związku Esperanckim (U. E. A.).

6) P. M. Czerwiński — Deklamacje.

Uprasza się członków o wprowadzedzenie gości.

Łódz. En „Kurjer Łódzki" № 106 ni legis tre bonan fruntan artikolon pri Esperanto. La aŭtoro — s-ro *Stefan Kaźmierczak*, tre lert-maniere konigis al la legantoj mallongan historion de nia ideo, kiun tiel genie solvis D-ro Zamonhof, kaj raportis pri nuna stato de la esperantismo, pri la movado k. t. p.

Ni gratulas lin pro tio!

Kielce. En la lokan virinan lernejon estas enkondukita instruado de Esperanto.

Kiel profesoro estas elektita d-ro M. Steckiewicz, militista kuracisto.

(El „Le Monde Espérantiste".)

Lvovo. La Komitato de Lvova Esperanta Ekspozicio energie laboras; al ĉitiu n-ro ni almetas la prospekton de l' Ekspozicio.

En **Mińsk** senlace propagandas Esperanton d-ro Antoni Niedźwiecki, kiu klopodas por fondi tie esperantan societon.

Łuków. Propagando estas kondukata de loka filio esperantista sub gvidado de s-ro Feliks Wierzchowski, kiu antaŭnelonge faris propagandan paroladon pri Esperanto.

